* La partaj ŝargoj $\varepsilon$ estis taksitaj laŭ (3). E estis trovita laŭ formulo[6];

$$E = \frac{N}{a + e}\left(\frac{e + 2}{2}\right)^{\frac{1}{e + 2}}$$

kie a — estas kvanto de atomoj, koordinitaj ĉirkaŭ la donita, kaj e — kvanto da elektronoj de valenta ŝelo, ne portoprenantaj formiĝon dela ligiloj.

** $R_k$ rilatas kovalentajn ligilojn, $R_i$ — la jonajn.

*** La frakciaj ampleksoj de $R_k$ $R_i$ aperas pro egaleco de la atomoj de oksigeno. Por e (rig. la furmulon supre) estis prenita meza amplekso, $e = 5\frac{1}{3}$ por $NO_3^-$ koj $CO_4^-$ kaj $e = 5$ por $NO_2^-$.

## LITERATURO.


1. A. E. Remick, Electronic interpretations of organic chemistrx, New Jork, — London, 1945.
2. J. Mathieu, A. Allais, Principes de synthese organique, Paris, 1957.
3. Bartoszewicz, W. Miecznikowska — Stolarczyk, B. Oprazadek; Metody redukcji swiazków organicznych, Warszawa, 1956.
4. Б. В. Токарев, Рефераты докладов научно-технической конференции Московского лесотехнического института. Секция химии и химическо<sub></sub>й технологии древесины, Москва 1967, стр. 32.
5. Справочник химика, под ред. Б. П. Никольского, I, М.—Л. 1962.
6. Б. В. Некрасов, Журнал общей химии, 16, 983, 1797 (1946).
7. R. H. Bathgate, E. A. Moelwyn-Hughes, J. Chem. Soc., 1959, 2642.
8. B. Bak, Kgl. Danske Videnskabernes Selskab, Matematisk-fysiske Medd., 24, Nº 9 1 (1946).
9. E. A. Noelwyn-Hugeh, J. Chem. Soc., 1938, 779.
10. G. Del Re, J. Chem. Soc., 1958, 4031.




# EL LA FAKOJ

## Sciigoj de la Terminologia Centro de I.S.A.E. (ISAE—TC—127)

(La fakoj estas evencigitaj laŭ la UDK. De nun ni uzos la simbolojn por lingvoj denove laŭ la Esperantaj nomoj, do: A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp.)

54 Preparas **KEMIAN NOMENKLATURON** baziĝantan strikte nur sur IUPAC, laboro en la kadro de TS de ISAE, s-ro Otakar MATULIK, Fuĉikova XIII/3985, Gotwaldov ĈSSR.

54 + 667.7 **Kemio. Kemia Tekniko.** — Deziras kunlabori pri terminologio de kemio, speciale lak-kemio, s-ro Klaus — Dieter Dungert, Albin — Brandes — Str. 3, DDR — 301 Magdeburg, GDR.

54 **Neorganika kaj organika KEMIO.** — S-ro Jan Pioro, Str. Reja 3/19, Piastow/Varsovio, Pollando, sendis al TC post eldono de „Kemiaj Afiksoj Internaciaj" kaj prilaboro de unua en Esperanto normo sub titolo „Ĝeneralaj nomoj de neorganikaj kaj organikaj kombinaĵoj" nun duan kemian normon sub la titolo „Fermentoj".

61 **Medicino.** — Med. D-ro Josef Hradil, Ĉesky Dub 137/III, Okr. Liberec, ĈSSR intencas krei novan Medicinan Revuon regule aperantan (ĉar tiu eld. en Japanujo ne regule aperas).

615.84 + 616—073.7 : 621.386 **Elektromedicinaj kaj X-radiaj aparatoj.** — La Sekcio de X-Radiaj kaj Medicinaj Aparatoj de la firmao Philips, kiun estras s-ro E. L. M. Wensing, vicprezidanto de UEA, eldonas ĉiukvaronjare revuon nomitan »Medicmundi«, kiu direktiĝas al radiologoj kaj terapeŭtoj. Ĝi aperas en angla lingvo, sed fine de ĉiu numero estas donataj resumoj en F, G kaj H lingvoj. Ek de 1968 tiuj resumoj ankaŭ aperas en Eo. La esperantlingvajn tradukojn s-ro Wensing prizorgas persone. Li ankaŭ prezentis esperantlingvan katalogon pri la elektromedicina programo de la „N. V. Philips' Gloeilampenfabrieken" en Eindhoven, Nederlando, esperante ke per la uzo de la Internacia Lingvo ĝi atingos la medicinan profesion de la tuta mondo. Apartan prospekton originale verkitan en Eo pri la „Rentgen-bildamplifilo" ankaŭ verkis Wensing; ĝi aperis en „La Praktiko".